

# Boletín<sup>★</sup>

MARZO-ABRIL-MAYO

JUNIO-JULIO-AGOSTO

SEPTIEMBRE - 1963

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

---


## LA XXIV.<sup>a</sup> HISPANA ESPERANTO- KONGRESO EN BARCELONA



Ĝenerala bildo de la partoprenanta samideanaro de nia XXIV.<sup>a</sup> Esperanto-Kongreso en Barcelona. La ŝtuparo de la Placo de la Reĝo inde enkadris tian ripetindan eventon.

Legu detalan priskribon de nia samideano S. Aragay en la internaj paĝoj.

VERA SUKCESO POR ESPERANTO!!



Solena malfermo de la Kongreso. La Prezidanto ekparolas.



... Kaj la ĉeestantaro aŭskultas. La urbestra salono pleniĝis.  
Pli vasta horizonto niu atendas. Antaŭen.

# Nia estro parolas...

En tiu ĉi unua numero de nia Bulteno, eldonita en Zaragoza, de la nova federacia estraro, mi volas, denove, danki ĉiujn la kunfederatajn samideanojn pro la konfido kiun ili montris al mi, kaj atesti al ili, alifoje, miajn bonajn volon kaj deziron, samtempe ke mi demandas, reciproke, ilian helpon.

Ni estas en tre favorema momento por plivastigi nian movadon. Restas malantaŭe ĉiufoje pli- la mokaĵoj kaj la malkonfidoj. La homaro sentas pli ol antaŭtempe, la fratecon inter ĉiuj siaj membroj... Sed por profiti la favoran momenton estas necese ke ni ĉiuj havu klaran konscion de nia devo kaj firman volon servi ĝin.

La lastaj pasintaj Kongresoj montris la pligrandigon de nia movado en nia lando kaj la entuziasmon de ĉiuj kiuj partoprenis tiajn Kongresojn. Tio donas al mi grandan konfidon en nia estonteco. Sed du aliaj virtoj estas necese akompani tian entuziasmon: la konstanteco, tiu konstanteco kiu permesas al la malgranda guto trabori la granitan monton, kaj la uĥueco, por ke ni, malgrandaj gutoj estu, kunigitaj, potenca kaj fruktiga fluo.

Via Prezidanto

MIGUEL SANCHO IZQUIERDO



## ĜOJIGA NOVAĴO!

En la Ĝenerala Kunveno de la HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO, okazinta en Barcelona la 27an de julio, dum la XXIVA HISPANA ESPERANTO KONGRESO, estis nomata Honora Prezidanto de H.E.F. Doktoro Rafael Herrero Arroyo.

Por ĉiuj federacianoj estis vere ĝojiga tiu rekono de liaj meritoj, kaj speciale por ĉi tiu bulteno al kiu li ĉiam oferdonis efikan kunlaboron.

Kvankam ĉiuj esperantistoj estas devigataj al Esperanto, tiu ĉi okazo estas unu el kiuj oni povas diri ke la esperantista ideo estas devigata al li, tial la honora signifo de lia nomigo.

# LA 48<sup>a</sup> KONGRESO DE UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO

P. González Cantero

Grandioza estis nia impresio alvenante la 3-an de aŭgusto 1963, je la sepa posttagmeza horo al Bulgarujo, kies ĉefurbo, Sofio, travivis radikan transformigon; estinte tipe orienta urbo kun 15.000 loĝantoj, ĝi dum nur kelkaj jardekoj nekoneble ŝanĝiĝas. Hodiaŭ ĝi havas 750.000 loĝantojn. La kotaj, kurbaj kaj mallarĝaj stratoj rapide cedas lokon al larĝaj rektaj bulvaroj, la malaltaj dometoj - al modernaj multetaĝaj konstruaĵoj. Ĝi senĉese renoviĝas kaj plibeligas. Sur malproksimaj spacoj, izolitaj de longegaj kvartaloj estas kreitaj entreprenoj por produktado de elektra energio, transporta tekniko, tramvojoj, trolebusoj kaj vagonoj, elektraĵoj, motoroj, rodioaparatoj, malvarmigaj instalaĵoj, medicinaj instrumentoj, k.t.p. Ĉiu kvartalo havas sian parkon, ĉiu angulo sian ĝardenon. Ekzistas 384 ĝardenoj kaj parkoj kun multaj kaj diversaj florbudoj, akvofaloj, k.t.p. Sur la stratoj oni plantis pli ol 80.000 ornamajn arbojn.

Oni vidis multe da Esperantaj flagoj. La Kongresejo kaj la Akceptejo situas en la Ŝtata Universitato «Kliment Ohridski», kies vastaj proporcioj faris el ĝi tre taŭgan Kongreslokon. Ĉe la enirejo flirts kelkaj Esperanto-flagoj kaj la afiŝejo super la pordo informis, ke tie okazos la «48<sup>a</sup> Universala Kongreso de Esperanto».

La Akceptejo havis ĝicetojn kaj bufedon. En aliaj etaĝoj estis la Kongresejo por la Kongresaj kunvenoj. Du salonojn oni dediĉis por la unua fojo al la emi-

nantaj Esperantistoj Privat kaj Bastien. Partoprenis 3360 kongresanoj el 36 landoj el ĉiuj kontinentoj, en vere internacia amikeco.

En mallonga periodo oni konstruis novajn modernajn ejojn de la Sofia Ŝtata Universitato, nomata Universiado kaj tie okazis la Interkona Vespero, la solena Malfermo, la oficiala Akcepto kaj la solena fermo, ĉio kun grandega entuziasmo kaj varmega etoso.

En la solena Inaŭguro la hispana reprezentanto deziris al ĉiuj bonan kaj sukcesan kunsidon nome de la Hispana Esperanto-Federacio, kaj diris, ke nur kun fido kaj sen timo estas ebla la solvo de la mond-problemoj por pli bona interkompreno de la diversaj popoloj kaj grupoj kaj ke nia sola celo devas esti la kreado de vera amikeco inter la homoj el ĉiuj mondpartoj, sendepende de ilia nacieco kaj haŭtkoloro kaj fine li gratulis tutkore la ĉeestantojn de la 48<sup>a</sup> Universala Kongreso.

La Bankedo, la Ekskursoj kaj aliaj kunvenoj estis vere kaj sincere miregindaj.

La Kongreso estis impona manifestacio, kiun neniu povos forgesi.

Do ĉiam antaŭen, Esperantistoj.

La spirito ligiĝas pro inerteo aŭ rutino al tio, kio estas por ĝi facila aŭ agrabla; tiu kutimo ĉiam trudas limojn al niaj konoj, kaj neniam iu penis por etendi kaj konduki sian spiriton tiel malproksimen, kiel ĝi povus iri.

28-an aŭgusto 1963a.

## ALVOKO DE JAPANUJO ANTAŭ LA 18<sup>a</sup> OLIMPIKO EN TOKIO LERNU KAJ PAROLU ESPERANTON!

Tre estimataj samideanoj!

Kiel vi bone scias, la 18a Olimpiko havos lokon en Tokio en la jaro 1964. Tiam multaj homoj el la tuta mondo vizitos Japanujon, kaj ni, Japanaj esperantistoj, forte deziras trovi inter ili multajn esperantistojn.

Ni varme akceptos ilin kaj povos havigi por ili ŝancon viziti diversajn vidindaĵojn aŭ prizorgi pri ilia travivado.

Estas tre feliĉe al ni se vi transdonos nian deziron al la koncernanta aŭtoritatularo en via lando konsilante praktikadon de internacia lingvo Esperanto.

Ne forgesu ke via favora agado pri ĉi tiu afero povus kaŭzi enkondukon de Esperanto kiel unu el la oficialaj lingvoj en estontaj Olimpikoj.

Laŭ la decido de la 48a Kongreso de Japanaj Esperantistoj, reprezentante la kongresanojn ni subskribas.

La prezidantaro de la 48a Kongreso de Japanaj Esperantistoj:

# LA PLEJ GRAVA HISPANA KONGRESO

Barcelono! Unika evento en la historio de la esperanta movado de nia lando! Ĉu pro la nombro de 600 gekongresanoj el ĉiuj la hispanaj regionoj kiuj renkontiĝis en Barcelono okaze de la 24-a Hispana Kongreso de Esperanto? Ne, en tiu ĉi kazo gravas ne nur la kvanto, la plej multnombra de ĉiuj la Hispanaj Kongresoj, kvankam kiel ekstera signo, konvene montris al la neesperantistoj la gravecon de nia esperanta movado, sed speciale pro la akceptado de Lia Ŝtatestra Moŝto de Hispanujo, Superega Generalestro S-ro Francisco Franco Bahamonde de la Honora Prezidanteco de la 24-a Hispana Kongreso de Esperanto.

Ankaŭ meritas reliefi la akceptadon fare de altrangaj eminentuloj de la politiko, eklezio, diplomatio, kulturo, edukado, gazetaro, radio kaj televido en la diversaj Honoraj Komisionoj de la Kongreso.

Tia amasa akceptado montras klare ke Esperanto jam estas matura por eniri en la vivon de nia lando kaj plenumi ĝian rolon, ĉar ekde nun la esperanta movado havas ĉiujn pordojn de nia lando malfermitajn.

La plej elstara aranĝo estis sendube la malfermo, okazinta en la Gotika Salono «Consejo de Ciento» de la urbo-domo. Prezidis ĝin kardinala Moŝto Benjamín de Arriba y Castro, Kardinalo de Tarragona; ĉef. kaj Episkopa Moŝto Gregorio Modrego Cefepiskopo-Episkopo de Barcelono; Rektora Moŝto Miguel Sancho Izquierdo, Honora Rektoro de la Universitato de Zaragoza kaj Prezidanto de H.E.F.; S-ro José M<sup>a</sup> Solé Saldaña, Prezidanto de H.E.I. kaj Prezidanto de la O.K., kaj aliaj aŭtoritatuloj.

Dum la kongreso oni multe laboris sur ĉiuj kampoj. Speciale intensa estis la agado de la Estraro. Horon post horo okazadis kunvenoj kaj kunsidoj en diversaj lokoj, dum en la sama tempo aliaj kongresanoj ĝuis diversajn ekskursojn tra la grafa urbo. Ĉar kelkaj aranĝoj devis okazi samtempe pro la ŝarĝita programo, tio malebligis la ĉeston de la esperantistoj al ili.

Oni povas supozi ke, ĉar la kongresa urbo havas multajn kaj belegajn vidindaĵojn, ne okazis Kulturaj Aranĝoj,

Meritis specialan atenton du konferencoj, unu el ili en hispana lingvo fare de nia Prezidanta Moŝto D-ro Miguel Sancho Izquierdo, kaj alia, esperante, farita de nia eksprezidanto D-ro Rafael Herrero.

Same meritas laŭdon tre sinceran la organizintoj de la Esperanta Ekspozicio, ĉar la plej vigla kaj taŭga montrado de la vivanteco de Esperanto kaj ĝia matureco kiel Internacia Lingvo, precipe sur ĉiuj kampoj de la scienca, kultura, socia, politika, kaj turisma vivo, estis pruvita pere de la multnombraj revuoj, libroj, gazetoj, afiŝoj, turismaj broŝuroj kaj la tre mirinda kolektado de poŝtkartoj kaj poŝtmarkoj de la tutmondo, prezentitaj sur belaj tabuloj.

Laŭ la programo ellaborita de la O.K. por la gejunularo honore al la deklaro de U.E.A. kaj T.E.J.O. deklaran-te la nunan jaron «Jaro de la Junularo en la Esperanta Movado» tre sukcesis la du organizitaj aranĝoj. La kulmina punkto estis la malfermo de la 2-a Hispana Junulara E-Kongreso, kie 4 reprezentantoj el la junularaj eksterlandaj asocioj salutis al la ĉestantoj tre emocie kaj amike. Sur etosa kaj elokventa nivelo elvolviĝis la H.E.J.S.-laborkunsido kaj la Junulara Oratora Konkurso, malgraŭ ke en tiu lasta nur partoprenis du junuloj.

Rilate la ekskursojn tra la ĉirkaŭaĵoj de Barcelono, oni organizis unu al Montserrat kaj Vich, en kiu urbo oni vizitis la tombon de la Vichana samideano S-ro Jacint Comella, veterano kaj pioniro de la E-movado en Vich; la dua tra la Klifa Marbordo, permesis al la gekongresanoj rigardi la plej belajn pejzaĝojn de la Kataluna regiono.

Dum la Fermo, la O.K. disdonis diplomojn al la plej elstaraj personoj esperantistaj kaj neesperantistaj kiuj dank' al iliaj kunlaboroj sukcesigis la 24-an Kongreson.

La ceteraj aranĝoj de la Kongreso okazis normale kaj oni povos ilin legi sur la sekvantaj paĝoj.

Estas menciinde ke la H.E.F.-estraro orde kaj efike komencis la gvidadon de la esperanta movado en nia lando dum la kongreso, kaj sincere ĉiuj esperan-

histoj senekscapte aprobis la aktualan vojon de Hispana Esperanta Federacio. Tia afero sendube estis la plej grava de nia interna movado, ĉar estas ko-

nate de ĉiuj la lastajn malfacilaĵojn kiuj trapasis nia Federacio pro la translokiĝo de la sekretariejo kaj pro la elekto de la nova estraro.

## AKCEPTADO DE LA GEKONGRESANOJ

MERKREDO. 24 JULIO

En la plej bela salono de la Provinca Delegacio de la Sindikatoj, situanta en la moderna strato Via Layetana, okazis la akceptado de la gekongresanoj. Sincere, la granda salono estis adekvata akceptejo ne nur pro sia privilegia pozicio en la centra parto de la urbo, sed ankaŭ pro sia amplekso. Kiel kulture la O.K. deĵoris ne nur laŭ la horaroj de la oficiala programo, sed ĉiutage dum la kongreso unu aŭ du estraranoj de la O.K. atendis, kaj helpi la kongresanaron. Iom malfrue alvenis la dokumentaro, sed tio ne gravis, ĉar kiam la kongresanaro tralegis ĝin kaj rigardis la belegan kongreslibron, insignon, urboplanon k.t.p. kore gratulis la Prezidanton de la O.K. S-ro. Solé Saldaña pro la luksa eldonado de la dokumentaro, kiu sendube estas unu el la plej belaj ĝis nun eldonita por la hispanaj kongresoj.

Babileme kaj amuze ĉiuj esperantistoj rigardis la Esperantan Ekspozicion kiu malgraŭ ne esti oficiale malfermita, ĝi jam enhavis la plej belajn eldonaĵojn de nia esperanta literaturo, interesajn poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn k. t. p. Iom post iom ĉiuj revenis al siaj loĝejoj, kiujn zorgeme la O.K. jam preparis.

Nokte la kongresanaro vizitis la lumfontanojn kaj partoprenis en la Kermeso organizita en la «Hispana Vilaĝo». Muzikaj kaj baloj akompanis nin ĝis la fruaj horoj de la tago 25-a.

Omaĝe al la diversnaciaj gekongresanoj, kantisto apartenanta al la «Aragonja Hejmo», amuzis la ĉeestantaron per la sekvanta kanto:

Voy a cantar esta copla  
al estilo esperantista,  
diciendo «Ĝis la revido»  
que «quí icir» hasta la vista.

ĴAŬDO, 25 JULIO

Matene daŭris la disdonado de la dokumentoj al la gekongresanoj ĝis la 10-a Horo. Poste komenciĝis la

## EPISKOPA SOLENA MESO

Mesofaris la Kardinala Moŝto de Tarragona D-ro Benjamín de Arriba y Castro en la Bazilika Katedralo. Dum la meso predikis la pastro Josefo Claramunt (Piĉaj Lernejoj). Tiu ĉi religia solenaĵo estis impona pro sia majesteco, precepe kiam la diversaj standardoj malfaltiĝis omaĝe al la Sankta Tabernaklo. Sekve la kongresanaro amase aliris al la Urba Domo en kiu estos okazonta la

## SOLENA MALFERNO

Iom post iom 600 aŭ pli da kongresanoj eniris en la miranda Gotikan Salonon «Consejo de Ciento». La tuta salono estis plenplena de samideanoj, kiuj side aŭ stare profitis eĉ la plej etajn spacojn. Poste per kortuŝa procesio eniris la Kardinala Moŝto, Kardinalo de Tarragono, la Ĉefepiskopo-Episkopo de Barcelono, la prezidanto de H.E.F., la prezidanto de O.K. kaj ceteraj aŭtoritatoj. Granda silente registis kiam nia prezidanta Moŝto D-ro Miguel Sancho Izquierdo salutis kaj bonvenigas al la kongresanoj per sinceraj kaj vere emociaj vortoj. Poste la Kardinalo de Tarragono D-ro Benjamín de Arriba y Castro malfermis la kongreson esprimante siajn bondezirojn por la Esperanta Movado kaj petante al ĉiuj utiligi Esperanton por la disvastigado de la pacaj kaj amaj ideoj de la Katolika Eklezio. Saĝe kaj elokvente rakontis al ni siajn diversajn kaj tre interesajn travivaĵojn rilate al la mortita Papo Johano 23-a kaj ankaŭ pri

la nova elektita Papo Paŭlo 6-a. Tondraj aplaŭdadoj sigelis la elstarajn parolaĵojn de la du eminentaj oratoroj.

Bonorde, la kongresanaro eliris el la

granda salono kaj gustumis refreŝigaĵojn en la apudaj salonetoj; kompreneble pro la granda amaso da samideanoj estis tiom malfacile komplezi la plimulton.



Post la Solena Meso, Kardinala Moŝto D-ro Benjamín de Arriba y Castro, pozas kun la esperantistoj.

## PALABRAS DEL PRESIDENTE DE H. E. F. EN LA SESION INAUGURAL DEL XXIV CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO

Quiero que mis primeras palabras como Presidente de la Federación Española de Esperanto sean para agradecer, en nombre de la misma, a S. E. el Jefe del Estado el que se haya dignado aceptar la Presidencia de Honor de este Congreso. Igualmente quiero manifestar mi gratitud a todas las autoridades que tantas atenciones han tenido con nosotros los esperantistas y de modo especial a los que nos honran con su presencia en este acto, comenzando por el Eminentísimo y Reverendísimo señor Cardenal que ha oficiado, además, el solemne Pontifical con el que hemos querido inaugurar las sesiones de este Congreso.

Yo celebro, de todo corazón, esta asistencia al mismo para que vean y sepan --los que no lo supieran ya-- lo que es y lo que no es el Esperanto;

como el Esperanto no es una tontería, ni una chaladura; menos, una secta camuflada que justifique ciertos recelos.

El Esperanto es algo claro y hermoso que se proyecta esperanzador bajo la luz del sol. Es un movimiento fraternal que ofrece a los hombres todos un medio de entenderse y entendiéndose, conocerse y conociéndose, amarse. Es, también, como en ocasión dije, a la vez que mensajero, mensaje; a la vez que medio de comunicarse los hombres sus sentimientos, sentimiento él mismo de paz y de hermandad.

Muchas gracias, señores, por avalar con vuestra presencia y prestigiar con ella esta reunión nuestra, esta reunión de hombres de buena voluntad que ven en el Esperanto, a la vez que un poderoso instrumento de comunicación

entre los hombres todos, una llamada a la paz que los ángeles de Belén anunciaron a los hombres de buena voluntad.

Yo quiero agradecer, también, a la Comisión organizadora y en especial, al Presidente del Instituto Español de Esperanto y Vicepresidente de la Federación, señor Solé Saldaña, su ingente esfuerzo. Las circunstancias especiales que hicieron que el peso de la organización del Congreso cargara sobre ellos, me permite a mi ahora, el poder agradecer ese esfuerzo en nombre de los demás miembros de la Junta de la Federación que, en estos momentos, inicia oficialmente su tarea.

Quiero, también, dedicar unas palabras de gratitud al doctor Herrero, al que con tanto entusiasmo y acierto rigió hasta ahora la Federación; él me llevó, hace tres años, a la Vicepresidencia de la misma y él dió asimismo mi nombre como Presidente en el pasado Congreso de Valladolid. Quiera Dios que su afecto hacia mí no le haya engañado en su propuesta.

Nuestra tarea es ardua. No lo digo para curarme anticipadamente en salud. Persisten las antedichas falsas concepciones de lo que el Esperanto sea, junto con la de aquellos que nos atribuyen —de buena o mala fe— la gran utopía de querer sustituir con el esperanto todas las lenguas vernáculas. No; no somos tan ilusos. El Esperanto aspira solamente a ser lengua auxiliar de todas ellas, para lo que reúne condiciones magníficas: lengua rica en matices, extraordinariamente fácil, lengua viva que, como tal, puede acomodarse al ritmo de los tiempos, y sobre todo, lengua neutral.

Esto es muy importante, ya que al querer imponer como lengua internacional la de cualquier país, cualquiera de esas lenguas que, como en un relevo, a lo largo de la Historia, han tenido su predominio en el mundo, habría de suscitar recelos en los demás países celosos de su propio idioma.

Y también tenemos ante nosotros la gran tarea de, a la vez que ampliamos nuestro campo y el número de los esperantistas conocedores y practicantes de este idioma auxiliar, llevar al espíritu de todos esta hermosa idea de comprensión, de amor, y paz que el Esperanto hemos dicho entraña. Incluso al espíritu de alguno de nuestros "samideanoj" que, acaso, no se haya pa-

rado a pensar en que esta palabra no dice que hablemos una misma lengua, sino que tenemos una misma idea.

Yo tengo que agradecer a Dios, aparte otras muchas cosas, el ser, como soy, tan optimista. Yo creo que el optimismo es una virtud y a la vez, el premio que Dios da a los que la practican. ¿Que surgen dificultades? Y ¿cómo no? ¿Qué empresa hay en la que no surjan? Pero las dificultades son para esto: para vencerlas.

"Obstine antaŭen", pues, como dice Zamenhof en su poesía "La vojo" (El camino), cuya frase, de la que he hecho —bien lo veis— lema de mi actuación desde esta Presidencia, quiere decir: "Adelante obstinadamente; adelante, apesar de todo".

Y ahora, permítanme unas palabras, mis palabras finales, dirigidas a estos queridos "samideanoj", dichas, consiguientemente, en Esperanto:

Mi volas antaŭ ĉio, saluti elkore ĉiujn vin, karaj gesamideanoj, kaj danki, el ĉi tie, ĉiujn H.E.F.-anajn esperantistojn pro la konfido kiun ili montris voĉdonante min.

Mi estas —jam antaŭe mi diris— homo de bona volo, varme entuziasta esperantisto; sed mi ne scias ĉu tio estas sufiĉe por sukcesi en la tasko kiun vi konfidis al mi. Diri ke la esperantismo estas en mi jam de multaj jaroj estas diri samtempe ke mi estas multaĝa, kaj mi ne estimas tion, bonan kondiĉon por pli facile atingi la jam diritan sukceson.

Mi, do, multe esperas kaj konfidas en miaj karaj kunestraroj kaj en ĉiuj vi, bravaj samideanoj, por ke vi kaj ili plenigu tion kion al mi mankas, kaj tiel, ĉiuj kune en komuna laboro; «atingi la celon en gloro».

#### PRIVATA LABORKUNSIDO

Malgraŭ ke en la programo oni indikis tre klare «laborkunsido de H.E.F. kaj delegitaro «multaj gekongresanoj ĉeestis en la laborkunsido nur kiel observantoj. Hazarde la O.K. trovis por la menciita aranĝo ampleksan salonon en la plej moderna konstruaĵo de Barcelono» Palaco de la Nacioj» pro tio la volonta ĉeestado de samideanoj ne kaŭzis ĝe:ojn, kontraŭe, reliefigis bo-



nege la diskutadon de la estraroj kaj reprezentantoj de la Esperantaj Grupoj. Financa problemo preskaŭ okupigis la diskutadon, tamen meritigas ke ni indiku la plej gravajn diskutitajn temojn kaj ĉefajn partojn de la tagordo: Legado de la aprobado de la nova estraro; translokiĝo de la dokumentoj, libroj, k. t. p. de la Federacio de Valencio al Zaragozo; eldonado de nia Bulteno; financa problemo; peto de la grupo «Hispana Esperanto Aŭroro» federaciĝi al H.E.F.; organizado de estontaj Hispanaj Kongresoj; jesan aprobon de la funkciado de la nova estraro; propono kunfondigi ĉiujn bultenojn kaj informilojn de nia lando en unu sola revuo; petoj kaj demandoj.

Dum la laborkunsido la sekretariino de H.E.F. f-ino Inés Gastón klarigis al la kongresanaro la aktualajn cirkonstancojn de la Federacio, same ŝi proponis ne altigi la jaran kotizon, ĉar la H.E.F.-estraro deziras per si mem scii kaj koni kiajn estas la malfacilaĵoj, ĉar momente pro la nefunkciado de la nova estraro, ĝi ne scias la elspezojn de la Federacio en Zaragozo pro la eldonado de regula bulteno, korespondado, k. t. p.

Montrante tre grandan apogon al H. E. F., multaj gekongresanoj proponis altigon de la kotizoj, ne dezirante atendi la rezultojn de la estraro en Zaragozo; tio difinas klare la sinceran fidon de multaj samideanoj al la nova estraro. Tamen F-ino Inés Gastón, neakceptis la proponojn de la samideanoj kaj dankis kore la deziron de ili, sed ŝi kredas pli saĝe kaj lerte atendi la rezultojn de la nova jaro, tiamaniere okaze de la venonta kongreso oni povos prezenti taŭgan proponon pri la altigo de la kotizoj.

Ĉiuj ĉeestintoj komprenis la intencan de la H.E.F.-estraro, sed iuj el ili petis almenaŭ altigi la protektantan kotizon. Post diversaj proponoj la kongresanoj kaj la H.E.F.-estraro interkonsentis nur altigi la protektantan kotizon, sed F-ino Inés Gastón indikis ke, kompreneble se iu samideano deziras aboni pli altan kotizon ol 60 pesetoj (abonanta kotizo) ili povas fari ĝin. Kuraĝe du samidenoj post la eldiro de la frazo jam pagis siajn jarajn kotizojn po 100 pesetoj. Granda aplaŭdo de la ĉeestintaro gratulis S-rojn Candido Cienfuegos, el Mieres, kaj Mariano Jacquotot el Palma de Mallorca.

Alia grava punkto de la diskutita tagordo estis la propono de S-ro Tur vicprezidanto de H.E.I. kiu nome de la

prezidanto de H.E.I. S-ro José M.<sup>a</sup> Solé Saldaña, proponis kunigi en unu sola revuo la plej gravajn bultenojn kaj informilojn de Hispanujo, t. e.: «Boletín de la Federacio, «Eŭropa Unio» de H.E.I. «H.E.J.S.» de la junulara sekcio de la Federacio kaj ceteraj. Bedaŭrinde pro la longeco de la paroladoj estas por ni neeble prezenti al la legantoj, ĉiujn ideojn favorajn kaj nefavorajn pri la deziro de unuigi en unu sola revuo, la aktualajn eldonaĵojn de nia esperanta movado, tamen malgraŭ ke la subskribinto de tiu ĉi artikolo treege deziras ke nia lando eldonu belegan kaj ilustritan revuon, taŭga ilo de nia movado, devis kontraŭstari la proponon, ĉar nek finance nek favore al la esperanta movado, ni estas kapablaj momente preni sur nin la eldonadon de ampleksa revuo, eĉ se la tri supre menciitaj bultenoj kunligus siajn fortojn. Aliaj samideanoj ankaŭ neakceptis la proponon de S-ro Tur, klarigante ke la Federacio devas kiel la hispana supera organizo eldoni sendependan kaj propran bultenon, kaj se iu alia organizaĵo deziras sincere labori por atingi la sopiratan, altnivelan revuon, ke ĝi helpu al la Federacio laŭ ĝia kapableco ne nur redakcie sed, finance.

Tiaj lastaj frazoj estis aprobitaj unuanime de la ĉeestantoj kiuj emociis laŭte esprimis al la estraro de la Federacio siajn samajn ideojn kaj celojn de altniveligi kiel eble plej rapide nian bultenon.

Tre tikla afero estis la elektado de la urbo kaj la dato por la venonta kongreso, tamen ankaŭ unuanime estis do akceptita la propono de D-ro R. Herrero celebri la venontan 25-an Hispanan Kongreson de Esperanto en Valencio kaj laŭ la ebleco, du tagojn antaŭ la I.K.U.E. Kongreso kaj tiamaniere kunligi nian kongreson kun tiu de la Internacia Katolika Unuigiĝo Esperantista kiu ankaŭ okazos en Valencio; tiucele la organizontoj ŝparos energiojn kaj sendube la efektiviĝo de nacia kongreso apud la internacia certe reliefigos tre bonege nian kongreson.

Ni finas dirante ke la laborkunsido estis vere labora kunveno kaj amike kaj samideane ĉiuj samideanoj esprimis kaj defendis siajn ideojn. Kaj nenion plu.

Ankoraŭ parolante ne gravajn aferojn, oni pogrupo forlasas la ejon kaj iom post iom ĉiuj marsas al la oficiala malfermo de la Esperanta Ekspozicio, sed antaŭ ol paroli pri tio, ni devas ankaŭ skize raportiti alian aranĝon.



D-ro Sancho Izquierdo post saluti al la ĉeestantoj, kuraĝigas la gejunulojn.

## JUNULARA KUNVENO

Temas fakte pri la malfermo de la «2-a Hispana Junulara Esperanto-Kongreso, kaj kompreneble dezirante la O. K. plenumi la decidon de U.E.A. kaj T.E.J.O. tre favore kunlaboris en la realigo de tiu ĉi kunveno. Amike kaj amuze pli ol 80 gejunuloj partoprenis en la kunveno, kiun, malgraŭ la serioza titolo, planis la Organizantoj kun la celo prezenti al la juna kongresanaro la kvar eksterlandajn reprezentantojn el siaj respektivaj Junularaj Organizoj. Ili estas la jenaj: S-roj. Uwe Joachim Moritz, Prezidanto de Germana Esperanto Junularo, Antonio de Salvo, reprezentanto de Itala Esperanto Junularo, Daniel Chevalier reprezentanto de Franca Fervoja Asocio kaj S-ino Jennifer Kounnas, reprezentantino de Angla Fervoja Asocio. Post la kutimaj salutvortoj la O.K. regalis al ĉiuj per refreŝigaĵoj, kiuj pro la varma vetero de la vespero plaĉis multege. Dum la saluto de unu el la eksterlandaj gastoj, eniris en la salono nia H.E.F.-prezidanto D-ro Miguel Sancho Izquierdo en akompano de f-ino Inés Gastón kaj f-ino María Pilar Gómez, kiuj nome de la H.E.F.-estraro partoprenis en la junu-

lara kunveno. Tre amike D-ro Sancho Izquierdo salutis la gejunulojn kaj laŭdis ilin pro iliaj laboroj kaj penoj por Esperanto. Ankaŭ parolis f-ino Inés Gastón distrante la ĉeestantojn pro sia bonhumoro kaj eldiroj. Konstatante D-ro Sancho Izquierdo, ke li devas malfermi la Esperantan Ekspozicion kaj la tempo forflugas tre rapide, oni fermis la junularan kunvenon kaj la kongresanaro foriris por rigardi la

## ESPERANTAN EKSPOZICION

Malgraŭ tio, ke la plejmulto el la kongresanoj jam vidis okaze de la disdonado de la dokumentaro parton de la Ekspozicio, ĉiuj senekscapte denove rigardis tre plezure la montritajn materialojn. La laboro de S-ro Gil kaj pliaj kunlaborantoj ne estis senutila, ĉar la ekspozicio multe impresis per si mem. Eĉ la esperantistaro, kiu aliffoje jam vizitis aliajn similajn aranĝojn ne povis ne laŭdi la kvaliton de la prezentitaj eldonaĵoj de la esperanta movado. Ni asertas ke la ekspozicio estis la plej bona kaj bela ĝis nun aranĝita; tia graveco estis konfirmita de «NO-DO» kiu post la fermo de la kongreso petis al la O.K. fotografii ĝin. Tiel do

atentu samideanoj kiam vi iros en la kinejoj ĉar eble oni projekcios filmon pri la 24-a kongreso.

## EKSKURSO AL MONTSERRAT KAJ VICH

VENDREDO 26 JULIO

Apud la loĝejo «Altlernejo Sankta Georgo» kvar luksaj aŭtoĉaroj kaj privataj aŭtomoviloj deiris de Barcelono je la 8-a horo. Nia granda karavano veturis al Montserrat, kaj bedaŭrinde pro la nebula vetero oni ne povis rigardi la pejzaĝojn de la ĉirkaŭaĵoj de Barcelono, sed kontraŭe, kiam iom post iom ni alvenis al la belega monto Montserrat la suno ekbrilis kaj tio permesis ĉiuj rigardi la naturajn belaĵojn de la plej mondfama monto de Katalunujo. Jam en la Monaĥejo la vizitantoj eniris en la internan parton de la preĝejo; aliaj vizitis la plej belajn montpintojn. Je la indikita horo denove la karavano marŝis, al Vich, tra la mirinda kamparo de la Barcelona Provinco. Post malfacila alveno al la granda placo de Vich, pro la mallarĝaj stratoj de la urbo, la kongresanaro ariĝis en granda grupo kiu orde vizitis la urbodomon, kie Prfo. Jaime Aragay nome de la esperantistoj de Vich salutis al la aŭtoritatuloj kaj dankis ilian helpon al la E-grupo de la urbo. Ankaŭ nia prezidanta moŝto D-ro S. Izquierdo, parolis, rememorante sian unuan viziton al la urbo kaj dankante al la aŭtoritatuloj

siajn bonvolon kaj helpon al la E-movado. Fine la reprezentanto de la urbestro, salutis la kongresanaron kaj priskribis la belaĵojn de la salonoj de la urbodomo.

Private ĉiuj samideanoj zorgis siajn tagmanĝojn kaj kiam estis fininta ĝin la samideanoj en amasa grupo vizitis la E-grupon en la sidejo de la Radiostacio «Vich». En la salono oni organizis ĥoron kiu akompanata fortepiane de Prfo. Jaime Aragay emocie kantis «La Esperon». Laŭ la petoj de iuj samideanoj, la eksterlandaj junaj reprezentantoj salutis al la Vichanoj kies vortojn tradukis Prof. Jaime Aragay, kiu alparolis katalune al la Vichanoj kaj dankis al S-ro Noceda Direktoro de Radio-Vich lian kunlaboron kaj helpon. Iom rapide, ĉar la tempo forpasis, oni vizitis la katedralon, perlo de niaj plej belaj konstruaĵoj, ĉar ĝi enhavas la unikajn pentraĵojn de la Vichana mondfama pentristo S-ro Josefo M.<sup>a</sup> Sert. Pere la aŭtoĉaroj oni translokiĝis al la tombejo de Vich kie oni omaĝis la ĵus mortintan veteranon de la esperanta movado S-ron Jacint Comella, kaj sur lia tombo, unu el la unikaj en Hispanujo kiu enhavas esperantajn tekstojn kaj la verdan stelon, oni deponis bukedon da floroj.

Lacaj pro la longeco de la vojaĝo, kaj pro la multnombraj vizitoj, la gekongresanoj alvenas en Barcelonon kun la celo ripozi, sed tre agrabla prelego atendas ilin

## PRELEGO

En la belstila Konstruaĵo «Kolegio de Advokatoj» Dr. Miguel Sancho Izquierdo prelegis pri «Europa Unio kaj la Komuna lingvo. Prezentis la preleganton D-ro R. Herrero eksprezidanto de H.E.F., kies prelego estis aŭskultata de

la publiko kun granda atento. Poste D-ro Sancho Izquierdo, kun klara prononco en flua hispana lingvo, majstre prezentis originalajn konceptojn pri Eŭropo. Tre volonte ni publikigas parton de la tre grava prelego:

*Resumo de la prelego en la Kolegio de Advokatoj*

**EŬROPA UNUIĜO KAJ KOMUNA LINGVO**

*Unue li komencas dirante, ke li tute ne celas fari majstran prelegon pri la Eŭropa Unuiĝo, sed nur prezenti la nunan staton de la problemoj kaj emfazi unu el ĝiaj aspektoj, nome la ne-*

*ceson de taŭga komuna lingvo. Poste li citas la diversajn provojn faritajn por tiu dezirata Unuiĝo.*

*Europo ne estas geografia unuo, sed spirita unuo, do necesas pensadi pri la spiritaĵ ligiloj kunigantaj la diversajn naciojn, kiuj konsistigas tiun Unuiĝon kaj iliajn homojn, kvankam kompre-*

neble necesas akcepti ankaŭ alian klason de ligoj, sed nur kiel rimedojn, nepre necesajn.

Konvenas kaj eĉ necesas politika armaturo, Eŭropa Konsilantaro, kaj ekonomia bazo, Komuna Merkato, sed tio ne sufiĉas. Necesas aliaj aferoj, inter kiuj komuna lingvo, sed tia ke ĝi taŭgu ne nur por ke la homoj de tiuj diversaj ŝtatoj de l'Unuiĝo sin reciproke komprenu, sed ankaŭ kaj ĉefe por kreadi inter ili la necesan medion de konfido kaj interkompreno en ĝia plej larĝa senco.

Li pruvis, ke Esperanto, lingvo nepre neŭtrala por ke ĝi plenumu sian celon, lingvo vivanta, facile adaptebla al la marŝado de la tempoj, facile prononcebla por diverslandaj personoj, estas necesa por plenumi sian celon kaj ne anstataŭigebla. Sufiĉas nur vidi la unuiĝon kaj harmonion regantaĵn inter la Esperantistoj, por kompreni ke tiu lingvo portus tiun saman spiriton en la tago, en kiu ĝi fariĝus oficiala helplingvo de tiu Unuiĝo de popoloj.

Per tre lerta saĝa kaj profunda prelego regalis D-ro Sancho Izquierdo la ĉeestantaron, kiu tre bone komprenis la mesaĝon de paco kaj ĝenerala kunlaboro. Tondra aplaŭdo kronis la supre cititan prelegon. D-ro R. Herrero resumis trafe la ĉefajn ideojn de la prelego kiun li nomis perlo de la oratoroj, kaj fine tuktore dankis lian majstran intervenon.

## EKZAMENNOJ PRI ESPERANTO SABATO, 27. JULIO

Matene okazis en eta salono de la Provinca Delegaciejo de la Sindikatoj la oficialaj ekzamenoj pri Esperanto. La tribunalo konsistis el la jenaj membroj: Prof. Jaime Aragay prezidanto (Barcelono), S-ro Salvador Gumá, helpanto (Reus), kaj S-ro Juan Devis, helpanto (Valencio). Deĵoris kiel sekretario, S-ro Victor Ortiz el Zaragoza.

Aprobis la Elementan Kurson (ESPERANTA KAPABLECO)

S-ino. M<sup>a</sup> Pilar Vaquero

F-inoj: Magencia Garcia

Carmen Conde Labajo

M.<sup>a</sup> Joaquina Iriguibel.

M.<sup>a</sup> Rafaela Uruña

S-roj. Jaime Giralt.

Roberto Ribas Torroja

Antolín Romo Escobar.

Antonio Tomasa Iglesias.

Carlos Virumbrales Carcedo


Aprobis la Mezan Kurson (INSTRUISTA ESPERANTISTO)

S-roj Pascual Gil Figuer  
Roberto Ribas Torroja.

La koncernan Diplomon, H.E.F. sendos al la ekzamenitoj kontraŭ anticipa pago de 25 pesetoj.

Tutkoran gratulon al la kuraĝaj geesperantistoj.

Pararele al la ekzameniga tasko la kongresanoj vizitis la monton Tibidabo. Per tramo kaj aŭtobusoj translokiĝis la samideanoj al la Templo de la Sankta Koro de Jesuo, kie la infana horo kantis mirinde la «Salve Reginan» (Saluton Reĝino) en Esperanto.



Gekongresanoj antaŭ la Templo de la Sankta Koro de Jesuo.

Vespere je la 4a, kaj en la sama salono kie okazis la ekzamenoj, komenĉiĝis la H.E.J.S.-laborkunsido. Pli da 100 samideanoj, kelkaj veteranoj de nia movado, partoprenis en tiu ĉi aranĝo. Kiel kutime, post la salutvortoj de la subskribinto kiel prezidanto de H.E.J.S., la gvidantoj de la diversaj fakoj de la junulara sekcio legis al la publiko la plej gravajn atingajojn kaj malfacilaĵojn de nia sekcio. Neagrablan aferon sciis la junula estraro, nome: ke unu junulo kiu dum du jaroj jam pagis sian jaran korizon al la Federacio t.e. 60 pesetoj, ne ricevis nian junularan bultenon H.E.J.S.; pro tio profitante ĉi tiun raporton ni atentigas ĉiujn gejunulojn, anoj de la Federacio kiuj ankoraŭ ne ricevis la junularan bultenon bonvolu komuniki al ni tian anomalion.

Pro la amplekso de la diskutoj ni ne povas enmeti nun la temojn kaj aferojn diskutitaj, tial la respektivaj notoj aperos en la estonta numero de la junulara bulteno.



S-roj J. Vélez kaj F. Merayo ricevas siajn premiojn post la Oratora Konkurso.

## JUNULARA ORATORA KONKURSO

La juĝistaro konsistis el S-ro Victor Ortiz, kiel reprezentanto de la H.E.F.-estraro, Prof. Jaime Aragay kaj S-ro José de la Cruz. La du partoprenantoj al la konkurso S-roj J. Vélez kaj F. Merayo antaŭ oratori interŝanĝis respektivajn salutojn. Poste Prof. J. Aragay paroletis pri la oratorarto elstarigante la kvalitojn necesajn por sukcesi antaŭ la publiko kaj sekve li malfermis la Oratoran Konkurson. S-ro J. Vélez unue kaj poste S-ro F. Merayo prelegis pri la jenaj temoj: «Ĉu ekzistas opono inter Arto kaj Scienco», kaj «Kiel la Esperanta Movado helpas la familian pacon». Altkvalite kaj kun tre bona prononcado la du partoprenantoj brilis en siaj koncernaj temoj, tamen plenumante siajn devojn la juĝistoj verdiktis favore al S-ro J. Vélez, pro la profundeco de la temo, al kiu Prof. Jaime Aragay nome de la O.K. liveris ekzempleron de la fama verko «Retoriko» de Ivo Lapena. Por premioj ankaŭ S-ron F. Merayo li ricevis alian tre faman verkon de Blasco Ibañez «Sango kaj sablo» Ni sube publikigas parton de la brila oratoraĵo de S-ro J. Vélez.

## ĈU EKZISTAS OPONO INTER ARTO KAJ, SCIENCO?

La scienco estas la kono de la materio ĉu organika, ĉu ne organika, kaj ĝia misio estas la esploro en la internajojn de la materio kaj abstrakta realeco por oferi siajn elpensajojn kaj atingajojn al servo kaj utilo de la homaro.

Arto estas la serĉo de la subjektiva naturo de la homo kaj ĝia celo estas ankaŭ servo kaj utilo al la homaro.

La scienco, kiel fonto el vivo kun esenca objektiva senco, havas progreson rektan kaj ascendan kaj tendencas al universala unuiĝo por etendiĝi sur la tuta mondo.

Arto, kiu estas destinita esprimi aŭ manifesti la emanaĵojn el la subjektiva vivo estas analogie ribela, anarĥika, ofte obskura kaj konfuza. Arto ne emas konkretigi en tuto unuforma kaj kompakta evoluanta laŭ ŝablono aŭ modelo, ĉar ĝia ebla unuiĝo signifus nekonceptebla unuiĝo de ĉiuj deziroj kiuj nestas en la internaĵo de ĉiu spirito; komuneco de ĉiuj kredoj imagineblaj; unuanima aprobo antaŭ unika

kaj universala koncepto pri la sentoj kaj emocioj, pri la beleco kaj la harmonio..

La alporto de la scienco al la homaro disvolviĝas en materia plano.

La alporto de Arto manifestiĝas en pli granda komprenemo al individualeco kaj al ĉiuj eroj aŭ elementoj kontribuantaj vigligi ĉi tiun individualecon.

La homoj en pure fizika plano estas submetitaj al samaj necesoj. La spirito pli iluminita dank'al lumo de la saĝeco kaj la justeco, kiel tiu pli mal iluminita pro la malscio kaj la malbonemo, ambaŭ estas sammaniere ene de respektiva korpo kun samaj necesoj, manĝi, trinki, dormi sinvesti, loĝi en hejmo, esti sanigitaj de iliaj malsanoj. Tial la scienco, destinita subteni tiujn necesojn, prezentiĝas kiel imperativa tuthoma bezono, kiu deflankigas ĉiujn malkonkordojn pri rasoj, religioj, politikaj doktrinoj, k. c., kaj kiu reciproke estas akceptata dankeme de ĉiuj.

Sed se en fizika aŭ materia plano ĉiuj estas antaŭ samaj necesoj tio ne okazas en spirita plano. La kapablo de ĉiu menso kaj la komprenemo de ĉiu spirito igas ne-eble la kaptadon de la arto en simila skalo, ĉu en ĝia grandeca grado, ĉu en la mesaĝo aŭ simbolismo de ĝia reprezentado.

Arto estas idealista esprimo de la vivo kiu perfekte adaptiĝas al la estetikismo aŭ juĝkapablo de ĉiu. Sammaniere kiel ni konceptas la spiriton kiel sendependan esencon, ankaŭ tiel ĉiu arta tendenco ĝuas kompletan memstarecon kaj estas la karakterizo de ĉiu spirita kapableco.


Arto kaj Scienco ne estas celoj en si mem. Ili estas, laŭ vortoj de Alberto Eistein, branĉoj el sama arbo kaj ĉiuj iliaj spiroj estas direktigitaj plejnobleligi la homan vivon, levigante ĝin el la vulgara sfero de la fizika ekzisto kaj kondukante la individuon al Libereco.

Konkorde al ĉi tiuj konsideroj, ne povas ekzisti opono inter Arto kaj Scienco. Konstatu kiel la teknika fako en la kreiĵo agas maniere ke ofte, oni ne scias kies finiĝas Arto kaj kie komencas la Scienco, kaj kontraŭe. En la nuna socia fenomeno, kiun ni travivas, tre ofte, Scienco kaj Arto en kurioza koincido troviĝas antaŭ samaj objektoj.

Nur la homa intereso -aŭ egoismo aŭ stulta ŝovinismo- povas starigi absurdan kaj kruelan kaj ŝajnan rivalecon inter Arto kaj Scienco ĉar nur la homoj povas diskutadi kaj intenci hezitiĝi la senmovan ordon de Dio kaj kontribui kun la naturo al la ĥaoso.

J. VELEZ

Dume, la kongresanoj kiuj ne partoprenis en la junularaj aranĝoj vizitis la Maran Promenejon kaj de tie per aera transportilo atingis la monton «Montjuich», kie ili vizitis la Militistan Muzeon. Farinte tion, la kongresanoj aliris al la belega Palaco de la Nacioj kun la celo aŭdi la intereseĝan...



D-ro. Herrero Arroyo prelegas.

## ESPERANTAN PRELEGON DE D-ro R. HERRERO

La problemo de la Eŭropa Unio estis denove pritraktata de D-ro R. Herrero, kiu laŭ kutime per sia raviga parolado, Esperanto estis por la aŭskultantoj anĝela muziko, ĉar sendube nia eksprezidanto estas en la unua vico de niaj plej elstaraj oratoroj de nia lando, ne

nur pro la profundeco de la ideoj, sed ankaŭ por la brilaj imagoj kiuj emajlas sian oratorajon. Parto de la Prelego:

## UNU MONDLINGVO POR LA TUTA MONDO

Li komencis asertante ke Esperanto estas, ĉefe, kultura movado, kaj tial la kulturaj aranĝoj estas la ĉefaj zorgoj de la diversaj poresperantaj organizaĵoj.

Eŭropo ne estas geografia, etnika nek politika koncepto. La vera esenco de Eŭropo estas kultura. Ĉiuj konkeroj de la greka kaj latina kulturoj fariĝis tutmondaj, pro la komunikaĵoj. Antaŭ ili ekzistis en la mondo brilaj kulturoj; egipta, kalde-babilona, hinda, ĉina kaj eble jam azteka kaj inka; tamen, ĉiuj restis preskaŭ senefikaj por la homaro pro manko de komunikaĵo; nur antaŭ jarcento oni komencis ekkoni la signifon de kaheloj, papiroj, hieroglifoj, k. t. p. Do, nur facila kaj kompleta komunikado de pensoj, eltrovoj kaj literaturaĵoj konsistigas la kulturon. Eŭropa kulturo estas la rezulto de malkaŝa laboro de verkistoj, kopiistoj kaj tradukistoj.

Nur meritas esti nomataj eŭropaj valoroj tiuj kiuj priskribas diversnaciajn aspektojn de la vivo. Nia granda Cervantes estis tial, nur hispana valoro, kiel ankaŭ Lope. Tamen Raimundo Lulio kaj Vives-ambaŭ antaŭsentintoj de internacia lingvo estis vere, eŭropaj valoroj. En angla literaturo, Shakespeare, kiu tiel multe ĉerpis de la itala formo, estas vere eŭropa, kiel Milton, kiu tiel abunde plugis la grekan kampon.

Dante, la pioniro de la moderna itala lingvo, estis pure itala, dum Boccaccio kaj Petrarca, kontraŭe, estis eŭropaj valoroj.

En la franca verkistaro, Ronsard, la granda poeto, estis nur nacia figuro, dum Amyot, la fama, sed malpli brila verkisto, estis vere eŭropa valoro. En la germana, Lutero, vera fondinto de la nuntempa germana lingvo, kaj Goethe, estis nur naciaj valoroj; Schiller, tamen, estis eŭropa, pro la naturo de siaj verkoj. Kial, do, Cervantes, Dante, Molière kaj Goethe estas konsiderataj kiel eŭropaj, kaj eĉ mondaj valoroj? Nur ĉar la presarto kaj la impona laboro de tradukistoj ebligis la diskoni-

gaĉon de iliaj ĉefverkoj en la tutan mondon. Do, tio kio eŭropigas kaj mondigas pure naciajn aspektojn de la kulturo, estas la forto de la disvastigado. Presarto, traduko, radiodissendo, televido, estas fortaj kulturaj periloj, «Internacia Lingvo kiu tiel multe faciligas la reciprokan komprenon, estas la plej valora kulturilo, kiu, en la naskiĝinta eŭropa koncepto, ne povas manki».


La prelegisto analizis la eblajn konkurantojn de Esperanto por okupi tiun postenon: angla lingvo, basic angla, dulingvismo, trilingvismo, helvetigo, k. t. p.; la aŭskultantaro ridis plenkore, antaŭ la primokindaĵoj eksponitaj de li.

Por ni, esperantistoj, la mirinda elpenso de Zamenhof solvas la problemon de la eŭropa kaj de la Tutmonda interkompreno, kiu ebligas tutmondan kulturon, harfendemaj spiritoj ĉikanas pri perfektigo de internacia lingvo, forgesigante ke, se Esperanto ne tuttriumfis, ne kulpas akuzativo, nek supersignoj nek korelativoj., sed la ĝenerala indiferecento, la netorelemo kaj la trudemo de multaj. Turka lingvo estas tre malfacila, kaj tamen, ĉiuj turkoj trovas ĝin taŭga, ankaŭ ĉina kaj somnia estas perfektaj por ĉinoj kaj finnoj. Tio kion oni devas perfektigi kaj plibonigi estas la bonvolon, la toleremon kaj la veran pacigan spiriton. Tial Ido, Okcidental, kaj Interlingua nur taŭgos por erarigi la mensojn kaj malfruigi la triumfon de Esperanto, kies verda mantelo proponas ŝirmon al ĉiuj interlingvistoj, laŭ la bela kanto de la granda kataluna poeto Hiacinto Verdager al la blua mantelo de la «Brunulineto» de Montserrat: «Mes gran es que l'Europa -mes gran es que la terra, lo vostre mantell blau-, A aquell que s'aixopluga -a aquell que s'en destera -; Dau-los abric... si us plau! La prelegisto tuŝis gravajn kaj tiklajn problemojn de Eŭropo, sed tiamaniere ke ĉiuj komprenis perfekte ilin. Centaj manoj varme aplaudis je la fino de la prelego. D-ro S. Izquierdo, per sentoplenaj frazoj, dankis la prelegiston.

Post nelonga babilado de la kongresanoj komenciĝis en la sama salono la

## ĜENERALA KUNVENO

En la estrado sidas la H.E.F.-estraro. Ĝia prezidanto D-ro Sancho Izquierdo, malfermis la kunvenon kaj post la ku-



Partoprenantoj de la Ĝenerala Kunveno de H. E. F.

timaj salutvortoj al la gekongresanoj invitis al f-ino Inés Gastón sekretariino, ke ŝi legu por la ĝenerala aprobo la punktojn aprobitajn okaze de la privata laborkunsido. Iom post iom la gekongresanoj akceptis ilin. Jam elĉerpita la tagordo malfermiĝis la spaco «Petoj kaj Demandoj». Tiam S-ro José M.<sup>a</sup> Solé prezidanto de H.E.I. proponis denove la kunigadon de la hispanaj esperantaj bultenoj Li proponis eldoni nur du: la Bultenon de H.E.F., por la sciigoj kaj la Komunikado inter siaj membroj kaj Eŭropa Unio (Kun tiu aŭ lia titolo) de H.E.I. Samtempe li proponis organizi «Diskan Klubon». D-ro Sancho Izquierdo akceptis la ideon fondi Diskan Klubon, sed rilate la alian aferon rememorigis tion: ke okaze de la privata laborkunsido la subskribinto nome de la H.E.F.-estraro refutis la proponon pri la kunigado de la bultenoj, kiu estis sekve neakceptita.

La subskribinto defendis denove la kriterion, lasi la E-grupojn kiel nun, t. e. ke ĉiu Grupo, Sekcio, Asocio, Federacio kaj Instituto havu la rajton eldoni propran kaj sendependan bultenon kaj konsekvence nek Hispana Esperanta Federacio nek Hispana Esperanta Instituto povu malpermesi al la aliaj E-societoj ke ili eldonu siajn proprajn eldonaĵojn. D-ro Sancho Izquierdo konscie konstatante ke multaj gekongresanoj, jam antaŭe, en la privata la-

borkunsido ankaŭ, nun malaprobis la menciitan proponon, kaj oficiale deklaris ne akceptita la proponon de S-ro José M.<sup>a</sup> Solé kaj tuje, nome de H.E.F., finiĝis la diskutadon.

Fine la gekongresanoj tre volonte akceptis diversajn proponojn, inter aliaj, la nomigo de nia kara eksprezidanto D-ro Herrero, Honora Prezidanto de H.E.F. Tondra kaj brulega aplaŭdo akceptis tian proponon farita de S-ro Gisbert.

Tiamaniere, kun granda vigleco, eble unu el la ĝeneralaj kunvenoj plej interesaj pro la diskutitaj temoj, finiĝis la ĝenerala kunveno.

## FERMO DE LA KONGRESO

DIMANĈO, 28 JULIO

En la belega «Ora Salono» de la Provinca Deputitejo okazis la disdonado de diplomoj al la aŭtoritatuloj kaj personoj neesperantistaj kaj esperantistaj kiuj kunlaboris kun la O.K. kaj sukcesigis la kongreson. Post la disdonado de diplomoj D-ro Sancho Izquierdo esprimis sian sinceran kaj emocian dankon al la O.K. kaj precipe al ĝia prezidanto S-ro José M.<sup>a</sup> Solé pro la brilaj aranĝoj kaj sindonema laboro por Esperanto. Dirite tion li deklaris fermita la 24-an Hispanan Kongreson de Esperanto en Barcelono.



Kiel etosa epilogo la kongresanaro kantis emocio la himnon «La Espero».

Ĉiuj rapidis por partopreni la Kongresan Bankedon, kiu okazis en la tre komforta kaj freŝplena hotelo San Antonio. Pli-malpli 300 gekongresanoj gustumis la tre riĉajn manĝaĵojn. Meze de la tagmanĝo la Prezidanto alparolis al la ĉeestantoj kaj ankaŭ petis al niaj elstaraj samideanoj ke ili ankaŭ faru same. S-roj Francisco Vilá, Antonio Gamboa, Jose M.<sup>a</sup> Solé, M. Semder, D-roj R. Herrero, Mariano Solá, E. Tudela kaj aliaj en ĉi tiu momento *nefor-gesebla* regalis al la publiko per seriozaj, gesebla regalis al la publiko per seriozaj, kiam la kongresanaro foriris el la hotelo.

---

Grava artisma evento estis la interveno de la Barcelona Municipa Muzikistaro en nia Kongreso, je la 10<sup>a</sup> horo vespere en la tradicia Placo de la Reĝo, kie la koncernaj profesoroj sub la taktilo de la Direktisto interpretis majstre diversajn muzikaĵojn kiuj forte impresis la kongresanaron.

## EKSKURSO AL LA KLIFA

### MARBORDO

LUNDO, 29 JULIO

Du aŭtoĉaroj ekskursis tra la modfama Kataluna Marbordo, kaj sincere tra la vorto mondfama esprimas certe la ideon ĉar grandega estis la surprizo de la partoprenintoj kiam konstatis ke preskaŭ la 100 el pocentoj de naĝantoj en la belega marbordo de Tossa ne estis hispanaj.

Brulega suno regalis al ĉiuj sian varmon kaj lumon dum la ekskursantoj ĝuadis belegajn pejzaĝojn de la ĉirkaŭaĵoj de Tossa.

Vespere revenis la aŭtoĉaroj al Barcelono kie neoficiale estis fermita la kongreso kun sincera kaj reciproka adiaŭo kaj koraj manpremoj. Plie ĉiuj esprimis siajn grandajn dezirojn renkontiĝi denove, dum la venonta kongreso en Valencio.

Tiel do ankaŭ la subskribinto finas ĉi tiun raporton dirante: GIS LA VENONTA KONGRESO EN VALENCIO!

S. ARAGAY

Okaze de la XXIV<sup>a</sup> Hispana Kongreso de Esperanto, la Hispana Esperanto-Instituto, kun la helpo de la prestiĝa SCHOLLA CANTORUM de la Barcelona Universitato, eldonis specialan diskon kiu enhavas la jenajn muzikaĵojn:

EMPORDA. Sardana (Kataluna danco)  
E. Morera-J. Maragall (trad. J. Aragay Pujols).

LA NAJTINGALO. Kataluna Popola

MONTAROJ DE KANIĜO. Kataluna Kanzono.

Popola Kanzono.

ĜOJU NIN! (Gaudeamus) Universitata Popola Kanto. (Trad. L. L. Zamenhof.)

Sub la lerta gvidado de la fama majstro Ernestro Cervera, la Schola Cantorum precize interpretis la supre cititan repertuaron, kies esperanta traduko plene adaptiĝis al originala stilo, ne nur de la verkistoj sed ankaŭ al tiu de la komponistoj.

Esperanto en tiu aspekto estas mirinda kaj unika lingvo de rava sonoreco kaj alta muzikeco.

«Diskos Vergara», per sia procedo SONOTON, certe atingis fidelan gravuradon kiel povos konstati kiu aĉetos la menciitan diskon.

Tutkoran dankon al ĉiuj!

## "La Espero"

(En la Gotika Kvartalo)

BARCELONO

28 an Julio 1963

Placo de la Reĝo, en kvartal' gotika!  
La nokto agrabla post varmega tago;  
fenestroj kun lumoj, dum verda l' flago  
flirtadis sur muro de palac' fortika.

La notoj majestaj kun stilo klasika  
De himno «L' ESPERO» en solena ago,  
Kortuŝis l' animon pro bela imago  
Al la ĉeestantoj en Koncert' muziko.

Neniam «L' ESPERO» sonis tiel bele,  
Nek tiel majeste en kort' poezia;  
Ĝi estis muziko ludita ĉiele;

Senmova la staro de rond' familia.  
—Placo de la Reĝo en kvartal' gotika!  
Mirinda la Placo pri son akustika!

M. de Elezcano

(BILBAO)

## Barcelona, la Bela

Kun la plej korinklino, al tre bonaj  
amikoj: Juan Flaquer. Francisco Alsina

Plezur', ekzalto, ĝoj' kaj emocio  
Pentras min. Grafurb', ho! dia ben'!  
Tra *ramblas*, montoj, valoj kaj haven'  
Mil gajaj strofoj ŝvebas. Melodio!...

Pro viaj multaj logoj kaj gracio,  
En mi estiĝis, loĝas la ĉagren':  
Ne pentri, kiel Goya kaj Ruben',  
Sorĉmane, plej artisme, kun magio.

Surtere svarmas homoj sen komparo;  
Hirundoj, mevoj flugas super maro;  
Verdriĉe floras parkoj kun gazon'.

Sed belon mi ne povas, laŭ deziro,  
Redoni, sen talento kaj sen liro,  
Pentrinda urb', tre ĉarma BARCELON'!

Julio-1963

ADOLFO NUNES

Lisboa

## Paco kaj Amo

Leviĝu ni ĉiuj kun firma decido,  
la penso serena, la koro pli varma  
kaj antaŭ la mondo banala pro ridc  
ni montru la florojn de l'paco plej  
[ĉarma.

Ni montru la vojon de l'frata kom-  
[preno  
kaj diru la veron, kuraĝe, konstante.  
Ni kantu la Himnon de pura deveno  
kaj ni ne laciĝu, al Majstro pensante.

Ni restu fidelaj al cel'harmonia  
kaj amu la homojn el kvin kontinentoj,  
kaj pere de lingvo neŭtrala, gracia,  
la mond'al ni venu kun plej karaj  
[sentoj.

Laboru ni ĉiuj kun nobla fervoro!  
Se estus necese, pro ĝi ni suferu.  
(Ĉe l' amo plej granda fluadas la ploro)  
Ni ĉiuj laboru kaj ĉiam esperu!

Kaj vi, gejunuloj, ĝardeno floranta  
altenu la stelon en forta realo!  
Kaj supren la koroj por lingv' Espe-  
La vivo ne gravas sen la Idealo. [ranta!

FRANCESC VILA

EN LA XXIV<sup>a</sup> HISPANA KONGRESO  
DE ESPERANTO

Barcelona, Julio, 1963

# KONKLUDOJ APROBITAJ DUM LA XXIV<sup>a</sup> HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

- 1.º Estas aprobita de la kongresanoj la translokigo al Zaragoza de la Federacia sidejo kun la diversaj servoj.
- 2.º Rilate al la propono ke Boletin estu eldonita kune al aliaj revuoj, oni interkonsentas ke ĝi daŭrigu kiel ĝis nun.
- 3.º Akcepti la Grupon «HISPANA ESPERANTO AŬRORO» kiel fako de H.E.F.
- 4.º Akcepti Valencion kiel kongresurbon por la venonta jaro 1964a.
- 5.º Adresi peton al Oficialaj instancoj por ke ili konsideru Esperanton kiel alian lernindan lingvon.
- 6.º Peti al Ministerio por Informado kaj Turismo, eldonon de Esperant-lingvaj broŝuroj.

## GLOSA ESPERANTISTA EN TORNO AL XXIV<sup>a</sup> CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO, 25 - 28 DE JULIO

Tener un ideal no es tan fácil como a primera vista parece, ni tan difícil que no pueda llevarse a la práctica si uno se empeña en ello. Depende principalmente de dos factores importantes: firme voluntad en sustentarlo y sinceridad no sólo en nuestras palabras sino también en los hechos. Estos postulados son válidos y aplicables igualmente en lo que al esperantismo se refiere.

Si ser esperantista, según la simple definición del Plena Vortaro, consiste en saber y usar el Esperanto, el esperantismo, desde el punto de vista netamente ortodoxo, no puede reducirse únicamente al conjunto de actos de determinada aplicación de la lengua internacional, desprovistos de todo calor humano o sentimental, por cuanto ello constituiría un rutinarismo de dudosa eficacia sociológica o un estéril ejercicio idiomático de poca transcendencia social ulterior.

El hombre no puede actuar a impulsos meramente materialistas que le conducirían irremisiblemente a la gradual pérdida de su propia personalidad, que ha de fundamentarse en la práctica del bien común en el medio en que se desarrolle su existencia.

Y para desarrollar tal labor humanizadora está obligado a ser sociable, es decir, tomar parte directa y activa en la tarea colectiva en la medida de sus posibilidades económicas y principalmente de su poca o mucha capacidad intelectual.

Siendo la familia humana un conjunto claramente heterogéneo, no sólo en sus caracteres étnicos o físicos, sino también en sus ideas u opiniones particulares, por la fuerza de una lógica natural, el esperantismo ha de estar integrado por individuos de distinta ideología, lo que da como resultado inmediato el que no haya absoluta coincidencia o identidad de gustos y pensamientos, lo que no ha de ser tampoco obstáculo infranqueable para que no pueda vivir en armonía con sus semejantes, si sabe cimentar su conducta sobre la base de recíproca comprensión y tolerancia.

Naturalmente que ello es a veces algo difícilillo; pero ha de intentarlo siempre si de veras ama el progreso de la sociedad en que vive. La uniformidad no es ley natural en el universo y esto ha de tenerse muy en cuenta.

J. ARAGAY

### TAGLIBRO DE FREŬDA TURISTO

(Malgranda kroniko pri la XXIV Hispana Kongreso de Esperanto)



Gekongresanoj promenas, (dekstre)  
S-ro Antonio de Salvo.

La bonvolaj legantoj jam scias ĉion pri la okazaĵoj de la ĉijara Hispana Kongreso; tial permesu, ke mi aldonu nur kelkajn personajn impresojn.

*Mardon, la 23an de julio 1963a*

La vaportrajna veturado igis min tiel malpura, ke oni povus kanti pri mi laŭ la asturia kanzono: «¿Cómo quieres que tenga la cara blanca, siendo carbonerillo de Salamanca?». Mi iomete hontas, do, kiam ĉe la Barcelona stacidomo mi ekvidas, ke atendas min la Prezidanto de H.E.J.S., Salvador Aragay: li kunportis knabinon kiu, vidinte min dum la pasintjara Roma Eksperimento, funkcias kiel rekonilo.

Vespere, la elito de loĝantoj de Manlleu -urbeto apud Barcelono- ĝuas mian paroladon pri «Esperanto, hodiaŭ. Bonŝance, Salvador tradukas katalunen.

*Merkredon, la 24an*

Ĉe la Kongresa Akceptejo en Barcelono mi renkontas aliajn 5 (kvin) knabinojn, kiuj partoprenis en la supredirita Eksperimento. Mi komencas kredi je tiu

statistiko, kiu diras, ke por ĉiu viro en Hispanujo estas je dispono 7 virinoj kaj duono (mi ege interesigas, interalie, pri la sorto de tiu duono). Pro mia daŭra ina kuneco naskiĝas onidiroj -bedaŭrinde neveraj- pri «itala korŝtelo».

*Ĵaŭdon, la 25an*

Kiam mi revenas hejmen, je la dua kaj duono nokte, la pordisto komprenigas al mi, ke venontfoje mi dormos ekstere. Mi klopodas, sed ŝajne sensukcese, ekspliki al li la ravecon de la Hispana Vilaĝo (Pueblo Español), kie mi estis ĝis tiu horo. Evidente tiu sinjoro ne posedas belamantan spiriton.

Je tagmezo kaj duono, post duhora meso, Kardinalo Arriba y Castro kaj Profesoro Sancho Izquierdo oficiale malfermas la Kongreson en la mirinda Cambrego «Consejo de Ciento», en la Urbodomo. La ruĝa vesto de la Kardinalo simpatie akordiĝas kun la verda flago de Esperanto kaj la blu-blanka uniformo de la gardistoj; pro tio mi ŝuldas dankon pro la trafaj diapozitivaj, kiujn mi faris.

Je la 18a, ĉe Restoracio «Nuria» malfermiĝas la dua Kongreso de H.E.J.S. Mi ĵus revenis de la impona Preĝejo honore de la Sankta Familio (Sagrada Familia), kies turojn mi supreniris piede: tial, kiam estas mia vico saluti la gekongresanojn, mi kapablas diri nur kelkajn vortojn. Nesciante pri la kaŭzoj de tia vortŝparemo, naskiĝas onidiroj pri «itala elokventeco».

Salutas ankaŭ la aliaj eksterlandaj reprezentantoj: Uwe Joachim Moritz (Germanujo), Daniel Chevalier (Francujo) kaj ĉarma anglulino, Jennifer Kounnas.

Dumnokte, mi promenas tra la gotika kvartalo kun kelkaj geamikoj, kaj ne konante la lokan situacion ĉiumomente mi riskas (!) eniri ejojn fifamajn.

*Vendredon, la 26an*

Ĉu por penti pro la nekonsciaj pekoj de ĉi tiu nokto mi ekskursas al Montserrat? Tute certe la vojo kiu kondukas al la Sanktejo, laŭlonge de glaciigaj abismoj, estas trafa invito al preĝado.

La «Moreneta», la Madono «de Montserrat estel», akceptas nin kun sia kuintima, neripetebla rideto. Ĉu eble ŝi jam

scias, ke pro kurioza prepararo la jur-  
naloj raportos, ke la partoprenintoj en  
la ekskurso estis 3.000?

Oni tagmanĝas en Vich, kie, pro la  
vetero bedaŭrinde nefavora, oni povas  
viziti nur la Urbodomon kaj la mirin-  
dan Katedralon. En la Sidejo de Ra-  
dio Vich, akurate ornamita per espe-  
rantaĵoj, ni spertas dum momento la  
ebriecon subtilan sin senti artistoj; ni  
registras ĥore «La Espero»-n.

Ni tiom ĝuis la amikan kunestadon,  
ke ni revenas al Barcelono kun du  
horoj da malfruo.

#### *Sabaton, la 27an*

Ĉi tiu estas por mi la plej bela tago  
de la monato, ĉar en ĝi oni pagas al  
mi la salajron (tiun de julio mi trovas  
preta je mia reveno). Estas do kun  
aparta ĝojo, ke mi supreniras al la  
Monto Tibidabo, kie -vizitinte la Tem-  
plon kaj aŭskultinte preĝkantojn en  
esperanto- mi kaptas la okazon uzi par-  
ton de la supredirita salajro en la di-  
versaj ludoj tie ekzistantaj.

Posttagmeze, ĉe la Provinca Delega-  
ciejo de la Sindikatoj, disvolviĝas la  
kunsido de H.E.J.S. kaj la Oratora  
konkurso.

#### *Dimanĉon, la 28an*

En la Ora Ĉambrego de la Provinca

Deputitejo la Kongreso oficiale fermi-  
ĝas. Tuj poste oni traslokiĝas al Ho-  
telo S. Antono por la oficiala bankedo,  
kie oni ricevos manĝaĵon abundan kaj  
bongustan, ŝaŭmvinon kun esperanta  
titolo kaj fine -majstra eltrovo!- rozon  
por la virinoj kaj cigaron por la viroj.

Vespere, oni sin retrovas en la Placo  
de la Reĝo kie, antaŭ nekomparebla  
scenejo, la Urba Muzikistaro de Bar-  
celona ludas honore de la gekongre-  
sanoj.

#### *Lundon, la 29an*

Ekskurso al la Klifa Marbordo (Cos-  
ta Brava): mi ne kunportis bankostu-  
mon, tial mi eniras vendejon komplete  
vestita, kaj mi eliras de la alia flanko  
en markonvena vesto.

Mallaboreme kuŝante sur la strando  
(mi) kaj vigle naĝante en la akvo (la  
aliaj), ni pasigas la tagon, ĝis kiam la  
sunsuĉo vokas nin al la reveno. Iom  
malĝoje ni kantas, sur la aŭtobuso. En  
Barcelono, ĉe la momento de la salutoj,  
mi promesas -temas pri facile plenu-  
mebla promeso- ke mi forgesos nek ĉi  
tiun Kongreson, nek la geamikojn,  
kiujn mi renkontis tie.

Dankon pro ĉio, kaj -ĝis revido!

ANTONIO DE SALVO

(Roma)

## ESPERANTISTA VIVO

### BRAZILA KRONIKO

En la urbo Uberlandia, solene oni festis la inaŭguron de Avenuo Esperanto  
dank' al la klopodoj de Uberlandia Esperanto Klubo, kies vigla agado estas imi-  
tinda.

Estis disdonitaj diplomoj al kursfinintoj de elementaj kaj superaj kursoj.

Spite la forta pluvado kiu longe faladis, amaso da personoj ĉeestis la sole-  
naĵojn de inaŭguro de la Avenuo kaj plenigis la ĉirkaŭaĵon.

Verŝajne la brazilaj samideanoj meritas sinceran gratulon.

#### *Agrigento - Sicilio Italujo.*

##### *Inaŭguro de Nova Strato.*

Atentante la petojn de tieaj samideanoj, D-ro. Giuseppe Sinesio, Urbestro de  
Porto Empedokle kaj fervora esperantisto, proponis al la urba konsilantaro la ti-  
toligo de nova urba strato al nia lingvo.

La propono estis plenplene aprobita de la konsilantaro kaj decidis inaŭguri  
la novan straton la 21an de Aprilo okaze de manifestacioj por la Unua Centjaro  
de la Urbo.

Esperantistoj estas petataj skribi salut' kaj gratulleterojn al sinjoro Giuseppe  
Sinesio dankante lin pro lia nobla gesto.

Adresu la korespondadon al

D-ro. Giuseppe Sinesio

Sindaco de Porto Empedokle

(Agrigento - Sicilio) Italujo

**BOLETIN DE LA  
FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA**

Direktoro: Domingo Martínez Benavente

Redakcia Komitato:

Angel Saleté  
Nicolás L. Escartín  
Emilio Gastón

ADRESOJ:

Hispana Esperanto Federacio

Prezidanto:

Dro. Miguel Sancho Izquierdo  
Str. Torre Nueva, 30, 1.º

Z A R A G O Z A

Ĝenerala korespondado:

Sekretariino:

Inés Gastón  
P.º Marina Moreno, 35, 4.º Dcha.

Z A R A G O Z A

Monsendoj:

Kasistino:

María Pilar Gómez  
Str. Bolonia, 14, 1.º

Z A R A G O Z A

Sendaĵojn pri statistiko

kaj informado sendu al:

S-ro. Salvador Aragay  
Str. Arce, 8

CORNELLÁ (Barcelona) Hispanio

Libroservo:

Dro. E. Tudela

Str. Ruzafa, 41 - VALENCIA

**PARA NUESTRO BOLETIN**

Donativos recibidos desde 1 de Enero  
a 31 de Agosto de 1963

		Ptas.
M. Ruiz	Madrid	33
C. Ollala	Bilbao	40
E. Larrouy	Bilbao	40
T. Apraiz	Bilbao	30
J. Lerroux	Barcelona	40
A. Costa	San Mateo	20
J. Anduix	Cocentaina	5
J. Cardenal	Tarrasa	15
A. Gil	Vilvestre P.	15
A. Asensi	El Palmar	5
E. Calvet	Tarragona	25
S. Gumá	Reus	60
V. Martín	Madrid	40
A. García	Bilbao	40
M. Cantalapiedra	Valladolid	15
R. Soto	Cangas de Onís	60
J. Salvá	Caldas de E.	40
J. Vigo	Martinet	20
P. Moreno	Madrid	90
M. Elézcano	Bilbao	25
J. Casanovas	Gerona	30
P. Masvidal	Bañolas	40
E. Alvarez	Madrid	40
J. Clement	Paris	13
J. M.º Bernabeu	Callosa de Seg.	30
J. Rodríguez	Madrid	25
T. Elizondo	Cheste	25
V. García	Tarrasa	15
F. Torre	Baena	40
A. Ballestín	Zaragoza	40
J. Vigatá	La Llagostera	40
E. E. Yelland	Aspremont	62
J. Estañ	Granada	80
M. Esteban	Zuera	10
D. Rodríguez	Madrid	100
R. Gisbert	Barcelona	15
V. Fernández	Valladolid	15
J. Guío	Zaragoza	25
J. Gironés	Barcelona	10
R. Moral	Benipeixcar	15
J. Gil	Paris	40
J. Perarnau	Tarrasa	380
A. Pascual	Alcoy	10
J. Valls	Mataró	40
J. Orós	Zaragoza	15
J. Ventura	Tarrasa	40

SUMA 1.853

(CONTINUARA)

La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinionon de H. E. F., ekcepte en okazo de oficiala komuniko; do pri la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

ATENTU: Ĉiuj samideanoj kiuj deziras aĉeti la publikigitajn fotojn en ĉi tiu bulteno, bonvolu peti ilin al Sro. Carmelo Bello, str. Coso, 39, 3.º - Manresa. Indiku dimensiojn. Prezo de ĉiu foto 9 x 14, 8 ptojn.; 13 x 18, 12 ptojn. kaj 17 x 23, 20 psetojn. Sendu la sumon samtempe kun la mendo, Antaŭdankon.



Sro. Uwe Joachin Moritz, Prezidantio de Germana Esperanto Junularo (maldekstre) kaj Sro. Aragay, Prezidanto de H. E. J. S. (dekstre), pozas por la fotisto dum ĝoja tosto.



Momento de la fino de la bankedo.



La akceptejo kaj ekspozicio.



Esperanto-ekpozicio. Amikeca interparolado.